
# 111-a Universala Kongreso de Esperanto



## DUA BULTENO

111-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
GRAZ
7.-8.8.2026

# Enhavo


Loka Kongresa Komitato ....................4
Bonvenon al la kongresurbo ....................5
La kongresejo ....................9
Utilaj informoj pri Aŭstrio kaj Graz ....................11
Provizora programo ....................18
Kongresa temo ....................19
KER-ekzamenoj de UEA ....................20
Paroligaj kursoj kun *edukado.net* ....................21
Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado ....................22
Hoteloj ....................25
Ekskursoj ....................33
  Antaŭkongresa ekskurso ....................33
  Postkongresa ekskurso ....................38
  Ekskursoj dum la kongresa semajno ....................43
    Tuttagaj ekskursoj ....................43
    Duontagaj ekskursoj ....................47
  Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ....................52
Bankedo ....................53
Aranĝoj ĉirkaŭ la UK ....................54
Pliaj informoj ....................55
Sekvu nin ....................56
Kontaktoj ....................57



Teksta parto en la ĉapitroj "Bonvenon al la kongresurbo" kaj "Utilaj informoj pri Aŭstrio kaj Graz" estas disponebla laŭ CC BY-SA 4.0.



Fotoj: Graz Tourismus, MCG, Hotel Mercure Graz City, Radisson Hotel Graz, Austria Trend Hotel Europa Graz, Kolpinghaus Graz, Greenbox, HIB Liebenau, Pixabay, Unsplash. Kovrilpaĝa foto: Graz Tourismus, Harry Schiffer

111-a Universala Kongreso de Esperanto

Graz, Aŭstrio, 1 - 8 aŭgusto 2026

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

## Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo

# Loka Kongresa Komitato (LKK)

**Ewald Schick:** Prezidanto kaj kontaktoj kun lokaj aŭtoritatoj
**Norina Schantl:** Vicprezidanto
**Matthieu Desplantes:** Vicprezidanto, sociaj retoj
**Alfred Heiligenbrunner:** Sekretario
**Karl Reinisch:** Kasisto, komisiito pri handikapuloj
**Philipp Schantl:** Loĝiga servo
**Philipp Prettenthaler:** Artaj aranĝoj, tekniko kaj sponsoroj
**Alberto Barradas:** Ekskursoj
**Julija Schlapsi:** Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj
**Marta Nowakowska-Desplantes:** Junulara programo
**Martin Gritsch:** Kontakto kun landaj aŭtoritatoj
**Lukas Prokop:** Kongresa Kuriero
**Vilja Neuwirth:** Amaskomunikiloj
**Herbert Kampl:** Amaskomunikiloj

# Bonvenon al la kongresurbo

Bonvenon al Graz (aŭ Graco en Esperanto), la urbo de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto!

Graz estas la dua plej granda urbo en Aŭstrio. Kun proksimume 300 000 loĝantoj Graz estas sufiĉe malgranda por estigi komfortan etoson, samtempe sufiĉe granda por proponi ĉiujn bezonatajn servojn. Nia kongresejo troviĝas rekte en la historia centro (enskribita en la mondan heredaĵon de Unesko), kiu estas kompakta, kaj la vidindaĵoj estas atingeblaj piede aŭ per efika transporta reto. Graz havas riĉan oferton de interesaĵoj, historiaj monumentoj kaj belaj lokoj. Vi povos ĝui promenon tra la stratetoj de la urbocentro, mirindan vidon el la monteto *Schlossberg* meze de la urbo, aŭ viziton de la impona palaco *Eggenberg*.

Graz estas la ĉefurbo de Stirio, regiono en la sudo de Aŭstrio, kaj en la ĉirkaŭaĵo troviĝas multaj belaj naturaj lokoj, ĉarmaj urbetoj, vinejoj, ĉokoladfabriko kaj, apenaŭ unu horon sude, Slovenio. Nepre uzu la ŝancon malkovri tiujn lokojn!

### Dokumentoj, vizoj

Ĉiu vizitanto devas havi validan identigilon, kaj tiuj de landoj ekster la Ŝengen-areo devas havi pasporton validan minimume tri monatojn post la forirdato, koncernajn vizon kaj asekurojn, samkiel revenbileton. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj kaj ke ili ofte ŝanĝiĝas. La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. Bonvolu konscii, ke nek la Konfresa Fako (KF) kaj la Loka Kongresa Komitato (LKK) povas influi la decidojn de la konsulejoj.

Ĉiu kongresano povas elŝuti la oficialan invitilon – konfirmon de sia aliĝo – uzante la mendilon. Ĝi devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. noti, ke la konfirmaĵo povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro. Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private. Se vi mendis loĝadon pere de UEA, oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj.

### Eniro en Aŭstrion

Ĉe la paĝaro *https://www.bmeia.gv.at/en/travel-stay/entrance-and-residence-in-austria/visa* troveblas la informoj por eniri Aŭstrion el diversaj landoj. Se oni ricevas la Ŝengen-vizon, oni povas libere cirkuli en la aliaj Ŝengen-ŝtatoj. Por la vizoj oni povas peti ne pli frue ol 6 monatojn antaŭ la vizito kaj ne pli malfrue ol 15 tagojn antaŭ la vizito. Kutime estas bezonata persona vizito de la konsulejo en la lando, kies civitano vi estas. Listo de landoj, kies civitanoj ne bezonas vizon, troveblas ĉe bmi.gv.at/202/Fremdenpolizei_und_Grenzkontrolle/Visumpflichtige_Laender/start.aspx.

### Asekuroj

Por trankvila restado, konsilindas havi vojaĝ-sanasekuron, ĝi ebligas al vi bone protektiĝi dum la restado en la kongreslando. UEA ne respondecas

pri asekuro de kongresanoj. Ne plu estas bezonataj iuj ajn atestiloj koncerne la malsanon KOVIM-19.

### Alveno al Graz kaj al la kongresejo

**Aviadile.** Graz havas malgrandan internacian flughavenon kun regulaj flugoj ĉefe al diversaj germanaj urboj, kaj somere ankaŭ al suda Eŭropo. La flughaveno en Vieno estos pli realisma celo por plej multaj kongresanoj, kaj Graz estas facile atingebla de tie per trajno aŭ buso. La flughaveno en Bratislavo ankaŭ povas esti alternativo.

- Graz (GRZ) – Aŭstrio
    - De la flughaveno vi povas facile atingi la ĉefstacidomon de Graz (*Graz Hauptbahnhof*) per loka trajno (*S-Bahn*-linio S5). Stacidomo troviĝas 300 m antaŭ la flughaveno.
- Vieno (VIE) – Aŭstrio
    - Buse: rektaj busoj de la kompanio Flixbus veturas ĉiun duan horon, la veturo daŭras du horojn kaj duonon.
    - Trajne: de la flughaveno iras rektaj trajnoj al Graz, aŭ kun ŝanĝo en la viena ĉefstacidomo (*Wien Hauptbahnhof*). La veturo daŭras tri horojn.
- Bratislavo (BTS) – Slovakio
    - Buse: la plej simpla maniero estas iri per buso de Flixbus al la viena flughaveno (1 h 20 min) kaj plu veturi de tie.
    - Trajne: necesas unue preni buson "61" aŭ taksion al la ĉefa stacidomo *Bratislava hlavná stanica* kaj poste preni rektan trajnon al la viena ĉefstacidomo.

## Lufthansa Group – la oficiala flugkompanio por la 111-a UK

Austrian

brussels AIRLINES

Eurowings

Lufthansa

SWISS

Profitu de la kunlaboro kun la aviadkompanioj de *Lufthansa Group – Lufthansa, SWISS, Austrian, Brussels Airlines, Eurowings, Edelweiss, Discover* – kaj optimumigu viajn vojaĝkostojn. Je via dispono estas la vasta itinerreto kun ĉirkaŭ 310 cellokoj tutmonde, same kiel transatlantikaj flugoj funkciigitaj de *Air Canada* kaj *United*.

Uzu la specialan ligilon lufthansa.com/nl/en/event/universala-kongreso-esperanto-2026 por ekscii la rabatitajn prezojn. La rabatoj validas por flugoj ĝis unu semajnon antaŭ kaj post la kongreso.

**Trajne.** Graz havas du trajnajn konektojn kun Vieno ĉiun horon, la veturo daŭras 2 h 30 min. Ekzistas ankaŭ rektaj trajnoj al Prago tra Brno, Munkeno, Berlino, Zuriko, Ljubljano, Triesto kaj Venecio tra Udino, Zagrebo, Budapeŝto, Vroclavo kaj Krakovo. Multaj urboj en Eŭropo estas atingeblaj per ŝanĝo en Vieno aŭ Salcburgo. Pli da informoj pri la itineroj kaj biletoj troviĝas ĉe *tickets.oebb.at*. Oni rekomendas aĉeti la biletojn anticipe: lastmomenta bileto estas pli kosta. Por veturo el/al alia lando, kontrolu ankaŭ en la retejo de la fervoja kompanio de tiu lando, la biletoj povas esti malpli kostaj: *cd.cz* (Ĉeĥio), *bahn.de* (Germanio), *zssk.sk* (Slovakio). La ĉefa stacidomo en Graz nomiĝas *Graz Hauptbahnhof* (*Graz Hbf*), ĝi troviĝas proksime al la urbocentro.

## La Aŭstraj Federaciaj Fervojoj (germane Österreichische Bundesbahnen; ÖBB) – la nacia fervoja kompanio de Aŭstrio – estas la oficiala trajnkompanio por la 111-a UK.

Vojaĝi per trajno estas unu el la plej daŭripovaj manieroj atingi la kongresurbon: la aŭstra fervoja reto funkcias plejparte per elektro el renovigeblaj fontoj kaj proponas komfortan, klimatamikan alternativon al aŭta aŭ aviadila vojaĝado. Ni ĝojas kunlabori kun partnero, kiu subtenas respondecan kaj medikonscian vojaĝadon tra Eŭropo.

Alklaku la jenan ligilon: mallonge.net/UK26trajnapartnero kaj enmetu la TAN-kodon **277XL9**. Tiam vi povos registriĝi kiel nova kliento kaj aĉeti viajn trajnbiletojn. Bonvolu noti, ke ĉiu persono devas krei novan ÖBB-konton specife por ĉi tiu kongreso. Ne eblas uzi ekzistantan ÖBB-konton, ĉar ĉiu retpoŝtadreso uzeblas nur unufoje en la rezervosistemo de ÖBB.

Registriĝo rajtigas vin al 22%-a kongresa rabato por ordinaraj biletoj de ÖBB, 10% -a rabato por internaciaj ordinaraj biletoj, kaj speciala prezo por la ÖBB Nightjet. Via klienta konto por la kongreso estos aŭtomate forigita post la evento kaj tial post via revena vojaĝo. La rabatoj validas por la datoj ĝis 3 semajnoj antaŭ kaj post la UK.




Foto: © Graz Tourismus, Harry Schiffer

**Aŭtobuse.** Multaj busoj de la kompanio Flixbus veturas al Graz de Vieno kaj de aliaj landoj. Graz ne havas veran busan stacidomon; busoj el Vieno haltas ĉe la haltejo *Girardigasse* en la urbocentro (ne elektu *Murpark*, ĝi estas malproksima), sed internaciaj busoj kutime haltas en *Webling*, pli for de la centro.

**Aŭte.** Graz estas atingebla aŭte per aŭtovojoj el Vieno, Salcburgo, Italio tra Klagenfurt, Ljubljano, Mariboro, Zagrebo. Ĉirkaŭ la kongresejo troviĝas limigita nombro da parklokoj. La tuta areo troviĝas en la tiel nomata blua parkzono: pagenda lunde–vendrede 9h00 - 20h00, sabate 9h00 - 13h00; maksimuma parkdaŭro: 3 horoj; dimanĉe senpaga. Pago ĉe parkaŭtomatoj, kiuj staras ĉe la stratrandoj, eblas kontante aŭ per bankokarto. Rekomendindaj estas anstataŭe subteraj parkejoj. La plej proksima sur la placo *Andreas Hofer* estas por mallarĝaj aŭtoj. Aliaj proksimaj alternativoj estas la subteraj parkejoj sub la aĉetdomo *Kastner & Öhler*, ĉe *Kaiser Franz-Josef-Kai* aŭ ĉe la Artodomo (*Kunsthaus*). Detalojn vi trovos en tiu ĉi retejo de Graz.

Tendumejo por loĝaŭtoj troviĝas en la sudokcidento de Graz, ĉ. 6 km de la urbocentro. Prezoj komenciĝas ekde 25 € por nokto (+2 € por ĉiu persono). Apude estas subĉiela naĝejo. De tie la buso 32 kondukas al la urbocentro en 20 minutoj.

**Bicikle.** BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) kunordigos biciklan vojaĝon al UK. La itinero dependos de la la ebloj kaj deziroj de la partoprenantoj. Por aliĝi, kontaktu BEMI kaj indiku de kie vi venos kaj kiom longe vi ŝatus bicikli: bemi-estraro@tejo.org.

Foto: © Graz Tourismus, Harry Schiffer



# La kongresejo

Nia kongresejo, inkluzive de la salono Zamenhof, estas **Congress Graz** – impona historia konstruaĵo kun elegantaj salonoj kaj modernaj teknikaj ekipaĵoj. Ĝi troviĝas tuj apud la ĉefplaco.

Ĝi estis konstruita iom pli frue ol aperis Esperanto, de 1883 ĝis 1885. Ĝi unue estis sidejo de la banko *Steiermärkische Sparkasse* (Stiria Ŝparkaso). En 1977-1980 oni faris el la konstruaĵo kongrescentron. Ĝia plej granda kaj bela salono estas la koncertejo *Stefaniensaal*, nomita laŭ la princino Stefanie de Belgio (edzino de kronprinco Rudolfo – filo de imperiestro Francisko Jozefo), kiu ĉeestis ĝian inaŭguron la 4-an de novembro 1885, kaj ĝi iĝos por semajno nia salono Zamenhof.

**Por kongresrilataj aferoj bv. skribi nur al kongresoj@co.uea.org.**


## La adreso estas:

**Congress Graz, Sparkassenplatz 1-3**
**8010 Graz, Aŭstrio**





© MCG Krug Gross © MCG Krug Klein



© MCG

### Kiel atingi la kongresejon per publika transporto

Ni forte rekomendas uzi la aplikaĵon BusBahnBim por plani veturadon per publika transporto en Graz. Ĝi donos al vi la plej taŭgan konekton. Ankaŭ Google Maps donas bonajn indikojn. Serĉu "Congress Graz" en la aplikaĵo por trovi la kongresejon.

Estas konsilinde unue veturi al la elektita hotelo, deponi la valizojn, kaj poste de tie atingi la kongresejon. Se tamen vi unue iros al la kongresejo, sube vi trovos utilajn informojn. Detalojn pri aĉetado de transportaj biletoj vi trovos en la sekva ĉapitro (p. 15).

**Nia kongresejo** nomiĝas Congress Graz kaj troviĝas tuj apud la ĉefplaco (*Hauptplatz*). Tie troviĝas tramhaltejo kun la nomo *Hauptplatz/Congress* kun multaj tramlinioj. Kiam vi estas ĉe la ĉefplaco, iru al la dekstra flanko de la urbodomo (kie estas banko *Steiermärkische Sparkasse*) kaj vi vidos Congress Graz en la strato *Schmiedgasse*. Tio tamen estas la malantaŭa enirejo – por iri al la ĉefa enirejo ĉirkaŭiru la konstruaĵon laŭ la dekstra flanko tra la strato *Albrechtgasse* kaj iru maldekstren en la unuan strateton, *Sparkassenplatz*.

Alia tramhaltejo, ankaŭ tre proksima, estas *Andreas-Hofer-Platz/Joanneumsviertel*. De tie eniru la straton *Landhausgasse* kaj iru maldekstren en la unuan strateton.

- De la ĉefstacidomo: elirinte tra la ĉefa elirejo, vi vidos ĉe la dekstra flanko du ŝtuparojn, kiuj iras suben al tramhaltejo. La dekstra ŝtuparo kondukos vin al la ĝusta flanko de la kajo. Tie eniru la unuan tramon, kiu venos: la linioj 16 kaj 17 kondukas al *Andreas-Hofer-Platz/Joanneumsviertel*, ĉiuj aliaj al la ĉefplaco en 8 minutoj.
- De *Webling* (kie haltas internaciaj busoj): transiru la grandan vojkruciĝon kaj veturu per la buso 32 ĝis *Jakominiplatz* (20 minutojn). De tie estas apenaŭ 10-minuta piedirado ĝis la kongresejo aŭ, se vi volas pliproksimiĝi per publika transporto, estas unu tramhaltejo ĝis la haltejoj *Hauptplatz/Congress* kaj *Andreas-Hofer-Platz/Joanneumsviertel*. La ĝustaj direktoj estas *Eggenberg* (linio 1), *Andritz* (linioj 3 kaj 5), *Smart City* (linioj 6 kaj 16) kaj *Wetzelsdorf* (linioj 7 kaj 17).
- De *Girardigasse* (kie haltas busoj de Vieno): ankaŭ de tie estas 10-minuta piedirado ĝis la kongresejo, aŭ iru al *Jakominiplatz* (200 m) por uzi tramon.



© MCG Wiesner Gross

# Utilaj informoj pri Aŭstrio kaj Graz

Turismaj informoj pri Graz troviĝas en Vikivojaĝo en Esperanto, la angla, germana, franca, pola kaj aliaj lingvoj.



Foto: © Graz Tourismus, Pixelmaker

### Geografio

Aŭstrio estas senmara lando en Mezeŭropo kaj federacia ŝtato konsistanta el naŭ federaciaj landoj. Ĝi estas plejparte montara lando: Alpoj kovras grandan parton de ĝia teritorio. La ĉefurbo kaj plej granda urbo estas Vieno, en la oriento de la lando. Graz estas la dua plej granda urbo kaj la ĉefurbo de la federacia lando Stirio, ĝi troviĝas en la sudoriento de la lando. Graz situas ĉe la suda flanko de Alpoj en la valo de la rivero *Mur*; ĉirkaŭas ĝin malaltaj montoj kaj sude etendiĝas ebenaĵo ĝis Slovenio.

### Historio

Aŭstrio evoluis el mezepoka duklando kaj dum jarcentoj estis regata de la potenca dinastio Habsburgo, kio helpis ĝin formi centran rolon en eŭropa historio. Post la fino de la Sankta Romia Imperio en 1806 la lando iĝis Imperio Aŭstrio kaj poste, ĝis 1918, duobla monarkio Aŭstri-Hungario. Post la mondmilitoj Aŭstrio fariĝis sendependa respubliko, en 1955 deklaris sian neŭtralecon kaj en 1995 aliĝis al la Eŭropa Unio.

La regiono Stirio en sudorienta Aŭstrio, kun ĉefurbo Graz, estas strategia ligo inter okcidenta kaj sudorienta Eŭropo. Dum sia historio ĝi estis loĝata de multaj diversaj popoloj: keltoj, poste romianoj, poste slavoj kaj ĝermanoj.

Graz estis unuafoje menciita en la 12-a jarcento, kiel la ĉefurbo de la nove formita duklando Stirio. Ĝi kreskis al grava administra kaj kultura centro sub la Habsburgoj, kun fortikaĵoj kiel *Schlossberg* kaj riĉa mezepoka kaj renesanca urbocentro – hodiaŭ rekonebla kiel monda heredaĵo de Unesko.

### Lingvoj

La oficiala lingvo de Aŭstrio estas la germana, pli precize la aŭstria germana, kiu iomete distingiĝas de la germana el Germanio per vortprovizo. En la ĉiutaga vivo multaj homoj parolas dialektojn el la aŭstro-bavaria grupo, aŭ diversgradajn miksaĵojn de loka dialekto kaj norma germana. Aldone la slovena, hungara kaj burgenlanda kroata estas regionaj oficialaj lingvoj en municipoj, kie vivas tiuj lingvaj malplimultoj.

Pro migrado kaj internaciaj studentoj vi povas aŭdi en Graz surstrate multajn lingvojn, ekz. la serban/kroatan, slovenan, rusan, ukrainan, araban, turkan, ĉinan, ktp. Interkompreniĝo en la angla por turisto ne estas problemo en plej multaj kazoj, ekzemple en restoracioj aŭ vendejoj.

### Klimato

Aŭstrio havas ĝenerale mildan klimaton, kaj malvarman en montaro. Pro sia situo ĉe la suda flanko de Alpoj, Graz havas pli varman klimaton ol multaj partoj de Aŭstrio, kun iom pli da suno kaj malpli da vento. En aŭgusto la temperaturo averaĝe atingas 25 °C kaj povas superi 30 °C.

### Loka tempo

UTC+2 (somere).

### Mono

En Aŭstrio oni pagas per eŭroj (EUR, €). 1 eŭro dividiĝas en 100 cendojn. Ekzistas 1-, 2-, 5-, 10-, 20- kaj 50-cendaj moneroj, 1- kaj 2-eŭraj moneroj, kaj 5-, 10-, 20-, 50-, 100-, 200- kaj 500-eŭraj monbiletoj (sed biletoj super 50 € estas maloftaj). **Havu kontantan monon kun vi**: pagi per karto eblas en ĉiuj superbazaroj kaj kutime eblas en restoracioj kaj kafejoj, sed ekzistas ankaŭ lokoj, kiuj ne akceptas bankokartojn (ĉefe ekster urboj sed ne nur) kaj vendejoj, kiuj akceptas ilin nur por pagoj pli altaj ol difinita sumo. Bankaŭtomatoj estas facile troveblaj en Graz.

### Elektro

La elektra tensio estas 230-volta. La elektringoj uzataj en Aŭstrio estas samaj kiel en Germanio (tipo F) kaj kongruaj kun tiuj de Francio (tipo E). Homoj el plej multaj eŭropaj landoj (krom interalie Britio kaj Irlando), Irano, Koreio kaj Indonezio ne bezonas adaptilon.



### Telefonado

La prefikso por telefoni de alilando al Aŭstrio: +43, sekvata de telefonnumero sen komenca 0 (ne ĉiuj numeroj havas la saman longecon).

### Interreto

Vifio (en Auxstrio: WLAN) estas kutima en hoteloj, sed ĝi ne nepre estas en restoracioj kaj surstrate.

### Medikamentoj

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton aŭ la folieton, kiu akompanas la medikamenton kaj entenas ĝian kemian priskribon/nomon. Informoj haveblas ĉe la informa budo de la kongresejo. Apotekoj nomiĝas en la germana lingvo *Apotheke* kaj ili estas indikataj per ruĝa A.

### Sanservo

Okaze de sanproblemoj aŭ medicina bezono oni anonciĝu en la informejo. Eksterlandanoj havu taŭgan konfirmilon pri sanasekuro, LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de la kongresanoj.

### Trinkakvo

La kranakvo estas trinkebla. En vendejoj kaj hoteloj eblas aĉeti mineralan akvon:

- *prickelnd* – kun gaso
- *mild* – milde gasa
- *still* – sen gaso

Duonlitra botelo da akvo kostas ĉ. 0,4 €.

Estas diferenco inter minerala akvo kaj tiel nomata «*Soda*». Minerala akvo originas de la tero. Soda, aliflanke, havas aldonitan gason kaj estas ĝenerale malpli multekosta.

Restoracioj plej ofte ne donas senpagan akvon, sed kutime eblas ricevi kranakvon (*Leitungswasser*) kontraŭ malalta prezo.

Foje en kafejoj estas aparta loko kun kruĉo da akvo, kutime kun pecoj de fruktoj aŭ legomoj ene. Tiam la gastoj mem verŝas por si tian akvon.

### Trinkejoj

La prezoj varias depende ĉu oni trinkas en surstrataj kioskoj aŭ en luksaj trinkejoj. La kromprezo povas esti kompreneble pli alta. En ĉiu trinkejo (plejofte ĉe la verŝtablo) pendas tabulo-menuo, sur kiu estas indikitaj la prezoj de la proponataj varoj. En restoracioj kutime oni disponigas menuon kun prezoj. Fumado ene de kunstruaĵoj estas malpermesita. Eblas fumi en gastĝardenoj antaŭ gastejoj.



Foto: © Graz Tourismus, Werner Krug

**Kutimaj trinkaĵoj**

- **Teo**: nigra, verda aŭ frukta (fakte: herba infuzaĵo).
- **Kafo**:
    - "Viena miksaĵo" (*Wiener Melange*): Mildan kafon oni preparas el espreso kaj varma lakto, kun malpeza tavolo de laktŝaŭmo.
    - "Plilongigita" (*Verlängter*): Espreso kun aldonita varma akvo, kiu tiel fariĝas pli milda kaj malpli intensa.
    - "Eta bruna" (*Kleiner Brauner*): Unuopa espreso servata kun taseto da lakto aŭ dolĉa kremo, por ke oni mem miksu ĝis la dezirata nuanco.
- **Senalkoholaj trinkaĵoj**: fruktosukoj, al kiuj oni tre ofte aldonas gasan akvon (*gespritzt*) aŭ sengasan akvon (*mit Leitungswasser*). Kutimaj en restoracioj estas ankaŭ gasa akvo kun citrono (*Soda Zitrone*), akvo kun sambuka siropo (*Holunderwasser*), *Almdudler* (populara gasa trinkaĵo el herbaj ekstraktoj) kaj diversaj limonadoj.
- **Biero**: bonaj bieroj estas vendataj preskaŭ ĉie, lokaj markoj estas Gösser, Puntigamer, Reininghaus kaj Murauer.
- **Vino**: la Morillon, la sinonimo de Stirio por Chardonnay, estas fama kaj aparte bona. En la vulkana regiono de Stirio, apud Sauvignon Blanc, oni povas trovi ankaŭ Welschriesling, Traminer kaj Pinot Gris, kiuj troveblas en la tiel nomataj "varietalaj insuloj".

### Trinkmono en restoracioj

Kvankam trinkmono ne estas deviga, ĝi estas pli atendata ol en aliaj eŭropaj landoj. Kutima trinkmono estas 5 ĝis 10 %, aŭ simple rondigo de sumo (ekz. se via sumo estas 47 €, donu 50 €). Trinkmono ne estas kutima en rapidmanĝejoj.

### Publika transporto

En Graz veturas tramoj, busoj, lokaj trajnoj (*S-Bahn*) kaj la funikularo de *Schloßberg* (ĝi estas parto de la transporta reto).

**La tramoj estas senpagaj en la malnova urbo**, t.e. inter la haltejoj *Jakominiplatz, Hauptplatz/Congress* (ĉefplaco, nia kongresejo) kaj ĉiuj apudaj haltejoj (*Südtiroler Platz, Kaiser-Josef-Platz, Andreas-Hofer-Platz/Joanneumsviertel, Schlossbergplatz, Finanzamt, Dietrichsteinplatz*). Ĉiuj haltejoj en la senpaga areo estas markitaj per la glumarko "Altstadtbim" ("Malnovurba Tramo"). Por veturi inter la indikitaj haltejoj ne bezonatas aĉeti bileton. Atentu: nur tramoj estas senpagaj, por la busoj necesas pagi!

Biletojn oni povas aĉeti per la aplikaĵo GrazMobil aŭ ĉe aŭtomatoj, kiuj troviĝas: ĉe gravaj haltejoj (interalie la ĉefstacidomo, *Hauptplatz* kaj *Jakominiplatz*), en tramoj, kaj en busoj. La aŭtomatoj en la busoj havas pli limigitajn eblojn kaj akceptas nur pagon per bankokarto. Se vi aĉetas paperan bileton per aŭtomato ekster transportilo, ne forgesu validigi ĝin enirante la buson aŭ tramon (bileto aĉetita en tramo aŭ buso jam estas validigita).

Baza transporta bileto validas por 1 horo kaj ebligas ŝanĝon de veturilo ankaŭ por reveturo. Tiuj biletoj validas en la tarifa zono 101, kiu inkluzivas tutan Graz kaj kelkajn najbarajn municipojn, inkluzive de la flughaveno, do pri tarifaj zonoj vi plej verŝajne ne devos zorgi.

| | **Baza prezo** | **Duonprezo*** | **Rabatita prezo**** |
|---|---|---|---|
| **1-hora bileto** | 3,20 € | 1,60 € | 2,10 € |
| **24-hora bileto** | 7,00 € | 3,50 € | 4,30 € |
| **10-zona bileto***** | 26,00 € | 13,00 € | 26,00 € |
| **Semajna bileto** | 20,90 € | | |

* Duonprezon pagas infanoj de 6 ĝis 14 jaroj (inkluzive) kaj grandaj hundoj (jes, ili devas havi bileton).

** Rabatitan prezon pagas junuloj de 15 ĝis 18 jaroj (inkluzive). Ankaŭ homoj ekde 65 jaroj pagas rabatitan prezon sed **nur se ili havas la karton** ÖBB Vorteilscard Senior de la aŭstra trajnkompanio. Ĝi kostas 29 €, do plej verŝajne ne indas fari ĝin, se oni nelonge restas en Graz.

Infanoj ĝis 5 jaroj (inkluzive) veturas senpage. Infanoj kaj junuloj havu legitimilon por pruvi sian aĝon.

*** La 10-zona bileto estas papera bileto, aĉetebla nur en aŭtomatoj aŭ kioskoj, kiun oni povas uzi por 10 veturoj (ankaŭ de pluraj personoj samtempe). Enirante veturilon stampu ĝin per maŝino tiomfoje, kiom da homoj veturas per ĝi.

**Rimarko:** La informoj validas por marto 2026. La prezo de biletoj kutime plialtiĝas la 1-an de julio; atendu iomete pli altajn prezojn dum la UK.

### Taksio

En Graz funkcias la taksiaplikaĵoj Bolt kaj Uber.

La ĉefa taksia kompanio en Graz estas Taxi 878. Kalkulu 4,9 € + 2,3 € por ĉiu kilometro. Taksioj, kiuj atendas antaŭ la ĉefstacidomo, ne estas pli kostaj. Multaj restoracioj estas je piedira distanco de la kongresejo.

### Sekureco

Aŭstrio estas ĝenerale sekura lando. Kiel en ĉiuj grandaj urboj, estu atentema pri dokumentoj, valoraĵoj, mono ktp kaj apliku la bazajn sekurecajn regulojn por vojaĝantoj. Ankaŭ atentu, se vi promenas tra parkoj dum la nokto (precipe *Stadtpark, Augarten* kaj *Volkspark*). Por plia sekureco, simple promenu ĉirkaŭ la parko.

La telefonnumero por ĉiuj gravaj krizaj okazoj estas 112, pliaj estas 133 (polico), 122 (fajrobrigado) kaj 144 (medicina helpo).

### Vendohoroj

Vendejoj estas fermitaj dimanĉe. La solaj esceptoj en Graz estas la superbazaroj en la flughaveno kaj la ĉefstacidomo, kiuj funkcias ĉiutage (06h00 ĝis 22h00 por tiu en la stacidomo). Vendejoj kutime fermiĝas sufiĉe frue vespere, tipaj malfermhoroj estas 07h00, 08h00 aŭ 09h00 ĝis 19h30 (18h00 sabate).



Foto: © Graz Tourismus, Tom Lamm



Foto: © Graz Tourismus, Pixelmaker

**Graz piede**

Graz estas kompakta kaj bone piedirebla urbo. La kongresejo troviĝas en la urbocentro, multaj gravaj turistaj vidindaĵoj estas facile atingeblaj piede.

En Graz vi povas navigiĝi per poŝtelefonaj mapoj / navigiloj kiel OsmAnd aŭ Google-Mapoj.

OsmAnd eĉ havas interfacon en Esperanto, funkcias sen interreto (se vi anticipe elŝutas mapon por la areo), kaj navigas ankaŭ piedirantojn laŭ trotuaroj. Ĝi disponeblas en la apvendejoj de Android kaj iOS, kaj ĉe *osmand.net*. Se vi (por Android) unue instalas la apvendejon F-Droid (de f-droid.org), vi povas per ĝi instali OsmAnd+ kun senlima eblo elŝutadi novajn mapojn. Por agordi Esperanton interfaca lingvo, klaku al la burgera menuo (☰) sube maldekstre, Agordoj > Aplikaĵaj agordoj > Lingvo de aplikaĵo (Display language), elektu Esperanton kaj konfirmu.

**Handikapuloj**

Urba konsilantaro por/de handikapuloj en Graz entuziasme kunlaboras en granda superpartia reto por plibonigi la situacion de handikapitaj personoj. Ekzemple, la publika trafiko disponigas tramojn (plej multajn) kun platformoj por rulseĝoj. La urbaj busoj havas malaltajn platformojn por facile en- kaj eliri.

Proksime de la kongresejo estas kelkaj specialaj lokoj por aŭtoj kun internacia blua legitimilo de handikapuloj. Kun tia legitimilo oni en Aŭstrio rajtas senkoste parki surstrate ĉie, kie aŭtoj rajtas parki kun parkbileto. Tamen en parkgaraĝoj kaj grandaj parkejoj oni ankaŭ pagas.

En la kongresejo estas lifto por rulseĝoj. Indukta aŭd-sistemo tie ankoraŭ ne ekzistas.

Disponeblos ankaŭ LKK-ano por handikapuloj – se vi kiel handikapulo havas specialajn bezonojn, bonvolu indiki tion en la aliĝilo aŭ reta mendilo kiel rimarkon, kaj ne hezitu kontakti *kongresoj@co.uea.org*.

# Provizora programo

**Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.**

| | |
|---|---|
| **1-a de aŭgusto, sabato** | Malfermo de la kongresejo je 10h00. Registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00. |
| **2-a de aŭgusto, dimanĉo** | Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Kongresa Temo. Inaŭguro de IKU/AIS. Ekumena Diservo. Nacia Vespero. |
| **3-a de aŭgusto, lundo** | Libroservo. IKU-prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Societo Zamenhof. Bankedo. Kongresa Balo. |
| **4-a de aŭgusto, mardo** | Libroservo. Esperanto-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Koncerto/Teatraĵo. |
| **5-a de aŭgusto, merkredo** | Tuttagaj ekskursoj (kongresejo fermita). |
| **6-a de aŭgusto, ĵaŭdo** | Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Esperanto-kursoj. Koncerto/Teatraĵo. |
| **7-a de aŭgusto, vendredo** | Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. KER-ekzamenoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero. |
| **8-a de aŭgusto, sabato** | Solena Fermo (10h00). Fermo de la kongresejo (13h00). |

Foto: © Graz Tourismus, Harry Schiffer



# Kongresa temo

## Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo

Universala Esperanto-Asocio invitas la esperantistaron kontribui al la kongresa temo de la 111-a Universala Kongreso: **“Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo”**.

Volontulado, nome la konsenta kaj kontenta daŭra engaĝiĝo, havas profundajn radikojn en la Esperanto-movado. Ĉiuj niveloj kaj sferoj de nia internacia komunumo – de lokaj kluboj ĝis la tutmondaj organizaĵoj – baziĝas plejofte sur bonvola ada laboro de nia diligenta kolegar', normale spontana, sed foje kadre de strukturita programo kun publika subteno.

La kongresa temo celas trakti kiel volontulado kontribuas kaj kontribuu ne nur al la disvolviĝo de nia movado, sed pli vaste al daŭripova evoluigo kadre de la Internacia Jaro de Volontuloj por Daŭripova Evoluigo, deklarita de la Unuiĝintaj Nacioj.

Volontulado ja ludas gravan rolon, ne nur en la vivigo de la Esperanto-movado, sed ankaŭ ebligante konkretan civitanan engaĝiĝon loke kaj internacie, transfake kaj solidare en la realigo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), ambicia sed konsentindega celaro por pli bona mondo, kiun UN difinis por la jaro 2030.

La esperanto-agado mem ne fremdas je la CDE: iuflanke esperanto estas pova ilo por interkultura kunlaboro, aliflanke la celaro kaj la valoraro de nia movado profunde koheras kun la CDE, tiom ke TEJO deklaras en sia statuto ke daŭripova evoluo estas esenca kondiĉo por la agado en ĝi.

Krome, Esperantujo ne estas verda insulo, kaj multaj esperantistoj ankaŭ estas aliaj -istoj kaj havas spertojn pri peresperantaj aŭ alimovadaj volontulaj agadoj rekte ligitaj al daŭripova evoluigo.

La kongresa temo estos kunordigata de Michael Boris Mandirola, iama TEJO-prezidanto kaj UEA-komitatano. Li aktive engaĝiĝas en la Esperanto-movado kaj ankaŭ ekster ĝi, ofte kun respondeca rolo rilate al volontula agado, kun speciala intereso pri daŭripova evoluigo kaj precipe pri ĝiaj ligoj kun la Esperanto-movado.

Ni bonvenigas programkontribuojn en diversaj formoj: prelegoj, diskutrondoj, trejnadoj, ekspozicioj, teatraĵoj aŭ eĉ pli malkutimaj formatoj.

Kontribuoj povas trakti, interalie:

- Formojn kaj kadrojn de volontulado lige al la CDE.
- La rilatojn inter Esperanto kaj la CDE kaj koncernajn agadojn
- La rolon de lingvoj kaj lingva justeco en volontula agado por daŭripova evoluigo.
- Konkretan volontulan peresperantan agadon rilate al la CDE.
- Atestojn kaj raportojn pri interkultura dialogo kaj solidareco pere de volontulado.
- La evoluon de volontulado en la cifereca kaj tutmonda kunteksto.

Ni invitas samideanojn kiuj emas kontribui al la kongresa temo prezenti siajn proponojn per la kontribua formularo kaj kunlabori per la dissendolisto KongresaTemo@Groups.io. La limdato por sendi proponojn estas la 30-a de aprilo 2026.

Ni kuraĝigas ĉiujn, kiuj per siaj spertoj, esploroj aŭ ideoj povas kontribui pri la temo, aktive partopreni en la estigo de la kongresa programo kaj tiel helpi kunkrei signifan, engaĝan kaj aktualteman Universalan Kongreson.

# KER-ekzamenoj de UEA je kvar niveloj

La KER-Ekzamena Centro de UEA dum la kongreso en Graz denove okazigos ekzamenojn, bazitajn je la Komuna Eŭropa Referenckadro.

Je ĉiu nivelo (B1, B2, C1 kaj C2) okazos **skribaj kaj parolaj ekzamenpartoj**, solveblaj **ĉeeste**, papere. Ĉi-lastaj konsistas el aŭdkomprenaj taskoj kaj antaŭkomisionaj buŝaj ekzamenoj (intervjuoj). La C2-nivelajn testojn (kaj nur tiujn!) paralele kun la paperaj ekzamenoj eblos trapasi **ankaŭ rete**.

La kandidatoj de la C2-nivelo povos samtempe partopreni ankaŭ la konkurson de UEA **La plej bona reganto de Esperanto en 2026**, kies regulojn legu en *edukado.net/ekzamenoj/ker/konkurso* kaj la partoprenintencon anoncu ĉe la aliĝo al la ekzameno.

**La ĉefa ekzamentago estos vendredo, la 7-a de aŭgusto**, kiam okazos laŭvice la skribaj ekzamenoj je ĉiuj niveloj (B1, B2, C1 kaj C2) kaj la aŭdkomprenaj testoj je niveloj B1, B2 kaj C1. **Atentu**, la aŭdkomprena testo de je C2-nivelo estos trapasebla **la 4-an de aŭgusto, mardon**, ekde la 13-a horo laŭ loka tempo. Vidu la horaron ĉe *edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj*.

La kandidatoj kiuj aliĝas al kompletaj aŭ nur al parolaj ekzamenoj devos havi ankaŭ intervjuon. Dumkongrese la nombro de lokoj por la parolaj intervjuoj estos limigita, sekve tiuj, kiuj ne volas aŭ ne povas ekzameniĝi en la kongresa semajno, povos trapasi la intervjuojn rete, pere de Zoom, en elektita tempo jam en julio aŭ aŭgusto. Fruaj aliĝintoj havos pli da ebloj elekti sian intervju-tempon.

**La limdato por aliĝi** al la kongresaj ekzamenoj kaj pagi la kotizon estas **la 15-a de junio**.

**La ekzamenkotizoj** varias laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA: *edukado.net/ekzamenoj/ker/*

*kotizoj*. Pri la pagenda sumo kaj pagmanieroj atendu la fakturon de UEA. Por dumkongresa aliĝo kaj/aŭ pago estos kalkulataj kromkostoj.

### Subvencioj

Ni atentigas, ke TEJO, *edukado.net* kaj kelkaj landaj asocioj (ekz. la franca, brita kaj usona) disponigos subvenciojn por siaj kandidatoj.

### Prepar-sesioj kaj provtestoj

La priskribo de la enhavo kaj la postularo pri la unuopaj ekzamenniveloj konsulteblas en la ekzamenpaĝo de *edukado.net/ekzamenoj/ker/priskribo*.

Edukado.net proponas al ĉiuj kandidatoj fari antaŭtestadon, solvi senpagajn provtestojn *edukado.net/ekzamenoj/ker/provekzamenoj* kaj en majo okazigos ankaŭ informprelegojn kaj preparsesiojn.

Dum UK en la programo de la Kleriga Lundo Katalin Kováts, gvidanto de la KER-Ekzamena Centro, okazigos informprogramon pri la sesioj, dum kiu eblos vidi specimenojn, ricevi konsilojn kaj starigi demandojn.

**Interesiĝantoj** vizitu la specialan kongresan ekzamenpaĝon *edukado.net/ekzamenoj/ker/uk* aŭ informiĝu ĉe la adreso *ker-ekzamenoj@edukado.net*.



# Paroligaj kursoj kun *edukado.net*

La porinstruista retejo *edukado.net* denove gvidos du paralelajn paroligajn kursojn — dufoje tage dum kvar tagoj.

La lecionoj de la unua grupo, kiun gvidos **Katalin Kováts**, celas **komencantojn kaj komencintojn (A1, A2)**, kiuj havos sinsekvajn 8 lecionojn. La kursmaterialo estos la libreto Poŝamiko, kiun eblos aĉeti en la libroservo aŭ en la kursosalono. La ĉeestintoj de ĉiuj ok partoj ricevos fine atestilon pri la partopreno. Observantoj bonvenas.

**Por la meznivelaj (B1, B2) parolantoj de Esperanto** estos same ok sesioj, sed laŭtage la sinsekvaj aranĝoj estos ripetoj, do, sufiĉas partopreni tage nur unu lecionon. La kurson por mezniveluloj gvidos **Sylvain Lelarge**.

Antaŭa aliĝo al la lecionoj ne necesas.

# Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj en la reta mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

### Bazaj informoj

UK akceptas mendojn nur de registritaj kongresanoj. Registrita kongresano estas konsiderata tiu, kiu ricevis konfirmon pri sia aliĝo kun la kongresa numero. Kongresanoj indikas siajn personajn informojn, kaj UK ne respondecas pri eventualaj mismendoj kaŭzitaj pro manko aŭ malĝusteco de tiuj informoj. UK devigas sin liveri ĉiujn servojn laŭ la priskriboj en la Dua Bulteno kaj ne respondecas pri (ne)plenumo de nemenciitaj servoj.

### Loĝado

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la loĝejo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la foriro de la loĝejo, do, la daton de la lasta mateno en ĝi.

Principe, eblas okupi ĉambrojn ekde la 14h00 de la mendita dato kaj endas forlasi la ĉambrojn ĝis la 10h00 de la lasta tago. Se pro iu kialo (e.g. malfruo de flugo) oni ne sukcesas alveni dum la unua mendita tago, nepre bezonatas sciigo per *kongresoj@co.uea.org* por ke la hotelo konservu vian mendon. Se vi ne okupos ĉambron dum la unua mendita tago, oni rajtas nuligi la rezervon kaj vi povas perdi la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo.

### Hazarda kunloĝigo

Eblas mendi 1 liton en dulitaj ĉambroj nur en la studenthejmoj H4 kaj H6, tiel vi akceptas loĝi kun alia kongresano en la ĉambro.

Aliajn dulitajn ĉambrojn oni disponigas nur al homoj, kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto al homoj, kiuj nepre volas loĝi en dulitaj ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ni rekomendas uzi la telegraman grupon de UK ĉe *uk.telegramo.org*.

### Frueco de la mendo kaj alternativoj

Ĉar la mendeblaj litlokoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial gravas, ke ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn, kiun la Kongresa Fako rezervos, se ne

eblas plenumi la originan mendon. El la reta mendilo eblas scii, kiuj loĝejoj ankoraŭ havas liberajn lokojn.

### Ekskursoj

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se alie indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). Bonvolu veni 15 minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj.

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj, presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilon kontraŭ suno, vento kaj eventuale pluvo aŭ malvarmo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝproblemoj, la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

### Ekskursaj kondiĉoj

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi ilin aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj kazoj oni klopodos averti la mendintojn kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la ekskurso(j)n.

### Limdatoj

La limdato por mendi antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn estas la 30-a de aprilo 2026. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj nepre kontraŭ krompago de 100 €. La limdato por mendi loĝadon estas la 31-a de majo. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj kontraŭ krompago de 40 €.

La ceterajn ekskursojn kaj la bankedon eblos mendi ĝis la elĉerpiĝo de liberaj lokoj.

### Pago kaj konfirmo de mendoj

La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago. Post la trakto la kongresano ricevas la konfirman mesaĝon de la Kongresa Fako.

Kiel daton de la mendoricevo oni konsideras la daton de la ricevo de la pago. Se la mendo ne estas plene pagita, bv. tuj pagi la diferencon. Se la ŝuldo estas malpli ol 20 €, oni povas pagi ĝin dum la UK.

### Malmendoj

Malmendoj devas esti skribaj (al *kongresoj@co.uea.org* aŭ per redakto de la reta mendilo). Ĉe malmendoj faritaj antaŭ la 1-a de majo oni riricevos la tutan mendosumon, minus 30 € por la administraj kostoj. Ekde la 1-a de majo ne eblas ricevi repagon.

### Transdono de mendoj

Eblas transdoni pagitan mendon al alia kongresano ĝis la 1-a de julio 2026. Por tio bezonatas skribi al *kongresoj@co.uea.org* kaj indiki, kiun mendon kaj al kiu oni transdonas. Post la trakto de la peto ambaŭ personoj ricevos novajn konfirmajn mesaĝojn kun la listo de menditaj servoj.

**Reklamacioj kaj repagoj**

Ĉiuj reklamacioj kaj postuloj pri la repagoj (ekz. pro neliveritaj aŭ neuzitaj servoj, nepartopreno k.s.) devas esti faritaj skribe al *kongresoj@co.uea.org* kun la titolo "Reklamacio" antaŭ la fino de aŭgusto 2026. Se eblas, la reklamacion oni faru jam dum la UK.

Atente traleginte la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi la retan mendilon.

**KIEL MENDI?**

Ĉiu kongresano ricevas al sia retpoŝtkesto personan ligilon por la reta mendilo.

Uzante ĝin, eblas ankaŭ ŝanĝi sian mendon poste.

Ne hezitu kontakti la Kongresan Fakon per *kongresoj@co.uea.org* kaze de ajnaj demandoj.



## Speciala oferto de la Libroservo

Partoprenantoj de la ĉi-jara UK povas profiti de speciala oferto de la Libroservo de UEA: mendu ion ajn el la stoko kontraŭ kongresa prezo kaj sen sendokostoj.

La menditaĵojn vi prenos rekte ĉe la Kongresa Libroservo, kie vi povas ankaŭ pagi por ili, se en via UEA-konto ne estis sufiĉa bonhavo.

Por ĝui la oferton, la mendo devas atingi la Libroservon de UEA antaŭ la fino de majo.

Rigardu la retan katalogon kaj mendu jam nun: katalogo.uea.org

Mendojn oni akceptas ankaŭ retpoŝte (libroservo@co.uea.org), telefone (+31 10 436 1044) aŭ letere (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Nepre indiku vian UEA-kodon en la mendo.

# Hoteloj

UEA sukcesis interkonsenti tre favorajn prezojn, ni invitas vin mendi vian ĉambron kiel eble plej frue por garantii komfortan bonprezan restadon dum la kongreso.

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (€) por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono.

### H1 Hotel Mercure Graz City****

*Lendplatz 36 to 38*

1 km — 14 min.

Tiu ĉi moderna kvarstela hotelo situas en la kvartalo Lend, proksime de la historia urbocentro. En la ĉirkaŭaĵo troviĝas pluraj kafejoj, restoracioj kaj vendejoj. La hotelo proponas klimatizitajn ĉambrojn kun senpaga vifio, televidilo, skribotablo kaj privata banĉambro kun harsekigilo. La prezo inkluzivas riĉan matenmanĝon, kaj aliron al la sporta ekzercejo kaj saŭno.

Sub la konstruaĵo troviĝas publika garaĝo (19 EUR je 24 horoj). Ne eblas antaŭrezervi lokon, sed kutime disponeblas liberaj spacoj.

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al kongresanoj, kiuj serĉas loĝadon en luksa hotelo en la centro de Graz.

**Prezo:**

- Unupersona ĉambro: 112 €
- Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 69 € p.p.
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 69 € p.p.



Foto: © Hotel Mercure Graz City

### **H2** Radisson Hotel Graz****

*Annenstraße 67*

**1,4 km** **19 min.** **11 min.**

Tiu ĉi ŝika moderna hotelo kun skandinavstila dezajno proponas komfortajn, klimatizitajn ĉambrojn kun senpaga vifio, televidilo, skribotablo kaj privata banĉambro kun harsekigilo, ŝampuo, duŝgelo. La prezo inkluzivas riĉan matenmanĝon kaj uzon de la sporta ekzercejo. En la hotelo troviĝas ankaŭ trinkejo.

La hotelo situas proksime de la ĉefa trajna stacidomo kaj havas bonan konekton kun la urbocentro. Por atingi la kongresejon per publika transporto, oni prenu la tramon 1, 4, 6 aŭ 7 de la haltejo *Esperantoplatz* ĝis *Hauptplatz/Congress*. Kontraŭpage disponeblas parkejo (24 EUR je nokto), ne bezonatas antaŭrezervo.

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al kongresanoj, kiuj serĉas luksan modernan hotelon kun oportuna trama konekto.

**Prezo:**
- Unupersona ĉambro: 102 €
- Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 60 € p.p.
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 60 € p.p.



## H3 Austria Trend Hotel Europa Graz****

*Bahnhofgürtel 89*

**1,5 km** **20 min.** **11 min.**


Tiu ĉi luksa hotelo situas proksime de la ĉefa trajna stacidomo kaj havas tre bonan konekton kun la urbocentro kaj la kongresejo – la tramo 1, 4, 6 aŭ 7 de la haltejo *Esperantoplatz* ĝis *Hauptplatz/Congress*.

La vastaj, klimatizitaj ĉambroj havas sonizolitajn fenestrojn, televidilon, fridujeton, skribotablon kaj akvoboligilon kun teo kaj kafo. En la privata banĉambro estas harsekigilo, ŝampuo, duŝgelo. Senpaga vifio funkcias en la tuta hotelo. La prezo inkluzivas riĉan matenmanĝon. Kontraŭpage (12 EUR je nokto) disponeblas publika parkejo.

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al kongresanoj, kiuj preferas loĝi en luksa hotelo kun bona rekta konekto al la kongresejo.

**Prezo:**

- Unupersona ĉambro: 120 €
- Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 72 € p.p.
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 72 € p.p.







# STUDENTHEJMOJ

## H4 Kolpinghaus Graz

*Adolf-Kolping-Gasse 6*

**1,1 km** **15 min.** **8 min.**

Antaŭ komenco de la 111-a UK ĉi tie okazos la Kongreso de Virinoj (AK2, legi pli en la p. 37).

Tiu ĉi moderna studenthejmo troviĝas proksime al la kongresejo. Loĝado ĉi tie mendeblas minimume por la daŭro de la Kongreso.

La prezo de loĝado **inkluzivas manĝojn**: matenmanĝojn, tagmanĝojn kaj vespermanĝojn dum labortagoj – ekde matenmanĝo lunde ĝis vespermanĝo vendrede. Haveblas kunviandaj kaj vegetaraj opcioj, ofte ankaŭ veganaj. Ne eblas malmendi manĝojn aŭ rericevi monon pro neuzitaj manĝoj.

Disponeblas unu- kaj dupersonaj ĉambroj. La prezo inkluzivas litotolaĵojn kaj mantukon, senpagan vifion, kaj uzon de komunaj spacoj – ekipita kuirejo, sporta ekzercejo, ripozĉambro. En la konstruaĵo ne estas klimatiziloj.

**Bazaj** ĉambroj estas unu- kaj dupersonaj. Ili enhavas apartajn unupersonajn litojn, labortablon kaj ŝrankon. La banĉambroj estas komunaj kaj situas ekster la ĉambroj.

**Komfortaj** ĉambroj estas nur unupersonaj kaj havas privatan banĉambron kaj fridujeton, aldone al ĉio inkluzivita en la bazaj ĉambroj.

**Unupersonaj apartamentoj** estas unupersonaj ĉambroj kun privata banĉambro, kuirangulo kun fridujeto, kaj televidilo aldone al ĉio inkluzivita en la bazaj ĉambroj.

La studenthejmo estas bone atingebla piede kaj per la rektaj senpagaj tramoj 4 kaj 5 ekde la haltejo *Finanzamt* ĝis *Hauptplatz/Congress*. La studenthejmo havas parkejon nur por bicikloj.

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al partoprenantoj de la Kongreso de Virinoj kaj al ĉiuj kongresanoj, kiuj serĉas komfortan loĝadon kun inkluzivitaj manĝoj.

- Baza ĉambro:
  - unupersona ĉambro: 49 €
  - dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 42 € p.p.
- Komforta unupersona ĉambro: 59 €
- Unupersona apartamento: 65 €











## H5 Greenbox

*Zentrum: Grenadiergasse 14*

650 m 9 min.

*TU: Brockmanngasse 31*

1,4 km 19 min. 7 min.

Tiuj ĉi studenthejmoj proponas unupersonajn ĉambrojn, kiuj estas kunigitaj al apartamentoj po 2-5 ĉambroj. En ĉiu apartamento estas banĉambro (2 banĉambroj, se temas pri 4- aŭ 5-ĉambra apartamento) kaj plene ekipita kuirejo kun forneloj, mikroondilo, potoj, teleroj, glasoj kaj manĝilaro.

En la ĉambroj troviĝas lito, ŝranko, bretoj kaj labortablo. La prezo inkluzivas litotolaĵojn kaj vifion. Ne estas matenmanĝo kaj klimatizado.

Tiu ĉi studenthejmo havas 2 konstruaĵojn, ambaŭ bone atingeblajn de la kongresejo. Ni ne povas jam nun diri, en kiu el la du konstruaĵoj estos via ĉambro, ĉar la studenthejmo distribuas la ĉambrojn laŭ sia interna plano nur pli proksime al la Kongreso. Kiam la informo estos disponebla, vi tuj ricevos la konfirmon.

Loĝado ĉi tie mendeblas minimume por la daŭro de la Kongreso.

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al personoj, kiuj ŝatus loĝi proksime al la kongresejo, kaj por kiuj taŭgas kundividi apartamenton kun aliaj kongresanoj.

**Prezo:**
Unupersona ĉambro: 43 €






## H6 HIB Liebenau

*Kadettengasse 19*

**4,2 km** **30 min.**

Tiu ĉi favorpreza studenthejmo troviĝas plej for de la kongresejo. Ĝi proponas unu- kaj dupersonajn neklimatizitajn ĉambrojn kun privata banĉambro. En la ĉambroj troviĝas apartaj unupersonaj litoj, labortablo kaj ŝranko. La prezo inkluzivas vifion kaj litotolaĵojn. Kunportu propran bantukon!

Ne estas matenmanĝo aŭ memzorga kuirejo.

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al kongresanoj, kiuj ŝatus loĝi favorpreze kaj por kiuj taŭgos vojaĝo per tramo.

**Prezo:**

- Unupersona ĉambro: 42 €
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 29 € p.p.






## MENDOJ DE ALIAJ HOTELOJ

Dank' al kunlaboro kun Graz Tourismus – la loka turisma buroo en Graz – eblas mendi ankaŭ aliajn hotelojn bonpreze, uzante la specialan ligilon *graztourismus.at/UK2026*!

Ĉiuj informoj tie disponeblas nur en la angla lingvo.

Tie oni trovas la liston de proponataj hoteloj, iliajn priskribojn, minimuman prezon kaj la kontaktinformojn de la hoteloj. Por mendi, oni devas elekti la hotelon, plenigi la demandaron por indiki la bezonatajn datumojn kaj sendi la peton al la hotelo. La hotelo sekve prilaboras la peton kaj rekontaktas la personon por trakti la pagon kaj konfirmi la mendon. La limdato por tiaj mendoj estas la 30-a de junio.

Bv. noti ke la mendoj estas prilaborataj rekte de la hoteloj kunlabore kun la turisma buroo. **UEA ne respondecas pri tiuj ĉi mendoj**, pagoj, ŝanĝopetoj, nuligoj aŭ aliaj demandoj – por tio oni kontaktu la koncernan hotelon.




*graztourismus.at/UK2026*

Foto: © Graz Tourismus, Harry Schiffer



# Ekskursoj

Ni invitas vin partopreni en la ekskursoj kun esperantlingva gvidado kaj malkovri la plej interesajn lokojn de Aŭstrio kaj Graz! Sube vi trovos ĉiujn informojn pri la antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, kaj la ekskursoj dum la kongresa semajno.

Se la sinsekvo de la vizitindaĵoj dum la ekskursoj ne povos okazi laŭ la priskribo, estos proponataj alternativoj. Pri la eventuala nuligo de programero(j) pro kialoj ekster la homa rego UEA ne respondecas. La partoprenantoj devas memstare atingi la lokojn de la komenco de la antaŭkongresa ekskurso kaj memstare forvojaĝi, fine de la postkongresa ekskurso.

Ĉiu partoprenanto respondecas pri la informo al UEA de siaj nomoj kiel enskribitaj en la pasporto (oni povas esti rifuzita en la ekskursoj se la nomo sur la mendolisto ne kongruas kun tiu en la pasporto).

## Antaŭkongresa ekskurso

### A1 VIENO: Blua Danubo

*28-a de julio – 1-a de aŭgusto (5 tagoj, 4 noktoj)*

Komencu la kongresan semajnon per kelkaj tagoj en unu el la plej allogaj urboj de Eŭropo! Ni invitas vin al Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio ĉe la blua Danubo. En agrabla Esperanta grupo ni malkovros la plej famajn vidindaĵojn de Vieno kaj ankaŭ kelkajn malpli konatajn lokojn.

**La prezo inkluzivas:**

- 4 tranoktojn en la hotelo Arcotel Kaiserwasser****
- 3 manĝojn tage – ekde matenmanĝo merkrede ĝis matenmanĝo sabate
    - matenmanĝoj en la hotelo
    - tagmanĝoj kaj vespermanĝoj (inkluzive de akvo) en restoracioj
- ĉiĉeronon en Esperanto;
- ĉiujn bezonatajn enirbiletojn;
- bileton por publika transporto (metroo, busoj, tramoj en Vieno) por la tuta periodo;
- bustransporton al Graz la lastan tagon.

**La prezo ne inkluzivas:**

- personajn elspezojn, hotelajn ekstraĵojn (ekz. trinkaĵojn en la hotelĉambraj fridujetoj aŭ pliajn servojn en hoteloj);
- aliajn individue elekteblajn enirbiletojn ekster la programo;
- flughavenan transporton;
- personan san- kaj/aŭ vojaĝ-asekuron.



## PROGRAMO

### 28.07 – mardo

Alveno al la hotelo (*Arcotel Kaiserwasser****, Wagramer Strasse 8*) ekde la 15-a horo. Ricevo de bileto por viena publika transporto (metroo, busoj, tramoj) por la tuta periodo. Libera tempo kaj tranokto en la hotelo.

**Proponoj por libera tempo:** Se vi alvenas sufiĉe frue, vi povas jam marde viziti kelkajn interesajn lokojn de Vieno. Jen kelkaj proponoj por vizitindaj muzeoj: Haus der Musik, Kunsthistorisches Museum, Belvedere, Museums Quartier, Museum für angewandte Kunst. Tuj apud la hotelo troviĝas la plej fama akva regiono de Vieno – Alte Donau, Kaiserwasser kaj Donauinsel. Tie eblas publike kaj senpage naĝi.

### 29.07 – merkredo

Matenmanĝo en la hotelo.

Komuna forveturo kun ĉiĉerono per metroo al granda piedira ekskurso en urbocentro. Ni vizitos la Esperanto-muzeon, faros fotojn apud monumento de L.L. Zamenhof kaj vidos la plej famajn palacojn kaj preĝejojn de Vieno.

En la urbocentro ni vidos *Opera, Albertina*, palacon *Hofburg* (tie estas 16 muzeoj kaj laboras la prezidanto de Aŭstrio), palacojn *Mollard, Kinski, Ferstel* (ĉi-tie troviĝas la fama kafejo *Central*), placon *Am Hof*, placon *Graben* (kun Pestokolono kaj la preĝejo de sankta Petro), gotikan katedralon de sankta Stefano (*Stephansdom*). La ekskurso finiĝos apud la Urbodomo (*Rathaus*), kie ni havos tagmanĝon. Post tagmanĝo estos duhora libera tempo por aĉeti suvenirojn aŭ ĝui trankvile la belecon de Vieno.

**Proponoj por la libera tempo**: promeni al memorigtabulo de Zamenhof (Florianigasse 8, tre proksime de Urbodomo) kaj poste viziti unu el la plej famaj kafejoj en Vieno, ekzemple Sluka aŭ Korb, kie lokuloj ofte havis Kafoklaĉojn.

Vespere ni renkontiĝos apud la katedralo de sankta Stefano (*Stephansdom*) kaj enprofundiĝos en la historion de la urbo dum la ekskurso pri mezepoka Vieno. Legendoj, mistikaj lokoj kaj plej malnovaj stratoj kaj preĝejoj de la urbo atendos vin.

Vespermanĝo estos en la taŭga por la mezepoka temo loko – en granda subtera restoracio. Tre proksime troviĝas metrostacio, per kiu ni povos reveni al hotelo (estas rekta konekto).

**30.07 – ĵaŭdo**

Frua matenmanĝo en la hotelo.

Tuttaga busa ekskurso al *Wachau* – la plej fama regiono apud Danubo, kiu estas enskribita en la listo de Monda Heredaĵo de Unesko. Tie ni vizitos la lokan vinrestoracion kaj la monaĥejon *Melk*.

Dum la ekskurso ni vidos belegaj pejzaĝojn de la rivero Danubo, vinurbeto *Krems*, ruinoj de kastelo *Dürnstein* (kie, laŭ la legendo, estis reĝo de Anglio



Rikardo Leonkoro), fama urbeto *Willendorf* kaj grandega monaĥejo *Melk* (vi ricevos enirbileton kaj trarigardos ĝin kun ĉiĉerono).

Tagmanĝo estos en vinrestoracio ĉe la Danubo. Ni sidos en la ĉarma ĝardeno kaj ĝuos vinon, sukon kaj lokajn manĝon kaj desertojn (ekzemple, faritajn de la famaj lokaj aprikotoj – *Wachauer Marille*).

Poste ni revenos al Vieno, vizitos la muzeon de ĝia historio (*Wien Museum*) kaj vespermanĝos. Tuj apude estos metrostacio, per kiu ni povos reveni al hotelo.

### 31.07 – vendredo

Matenmanĝo en la hotelo.

Komuna forveturo per metroo al plej fama palaco de Aŭstrio – *Schönbrunn*. Ĝi estas iama somera rezidejo de la imperiestrfamilio Habsburgo. Ni vizitos internajn ĉambrojn de la palaco kaj la pompegan barokan ĝardenon apud ĝi. La plej malnova zoologia parko de la mondo troviĝas same ĉi tie.

Ni tagmanĝos en la apuda granda bierĝardeno kaj havos duhoran liberan tempon por promeni aŭ ripozi.

Vespere ni partoprenos gvidatan ekskurson pri la muzika historio de Vieno – urbo de Mozart, Strauss, Beethoven, Vivaldi kaj multaj aliaj komponistoj, kiuj loĝis kaj laboris en la urbo.

Ni finos la tagon per vespermanĝo en tradicia vinrestoracio en Vieno kun loka muziko.

### 1.8 – sabato

Matenmanĝo en la hotelo kaj forveturo per turisma buso al Graz.

**Prezo:**

- Unupersona ĉambro: 1190 €
- Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 950 € p.p.
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 950 € p.p.



## A2 Kongreso de virinoj

*29-a de julio – 1-a de aŭgusto (4 tagoj, 3 noktoj)*

**La prezo inkluzivas:**

- programkotizon.

**La prezo ne inkluzivas:**

- loĝadon;
- manĝojn;
- personajn elspezojn;
- personan san- kaj/aŭ vojaĝ-asekuron.



La Komisiono de UEA pri Virina Agado okazigos kongreson kun la temo **“Virinoj, povoplenaj homoj“**. Prelegoj, debatoj, filmoj ebligos al ĉiuj, viroj kaj virinoj kune, interŝanĝi ideojn, emociojn, faktojn kaj fantaziojn.

Ĉiujn novaĵojn pri la Kongreso de virinoj oni trovu en Eventa Servo: *eventaservo.org/e/virinoj2026*

Por kontakti la Komisionon de UEA pri Virina Agado bv. uzi *virina-agado@groups.io*.

La kongreso okazos ĵaŭde kaj vendrede en la H4 Kolpinghaus Graz (*Adolf-Kolping-Gasse 6*).

Atentu! Mendante tiun ĉi antaŭkongreson, vi pagas nur ĝian programkotizon. Loĝadon ĉiu kongresano prizorgas mem. Por loĝi en H4 dum tiu ĉi antaŭkongreso, mendu ĝin per la reta mendilo – ĝi mendeblas ekde merkredo, la 29-a de julio.

**Prezo:** 40 €

# Postkongresa ekskurso

## P1 SLOVENIO KAJ KARINTIO: Inter Alpoj kaj Lagoj

*8-a – 12-a de aŭgusto 2026 (5 tagoj, 4 noktoj)*

Malkovru la mirindaĵojn de Slovenio kaj la sudan parton de Aŭstrio! Dum la ekskurso vi vizitos la ĉarman ĉefurbon Ljubljana, la faman groton de Postojna kaj la kastelon Predjama, la alpan lagon Bled, la smeraldan lagon Jasna kaj la aŭstriajn urbojn Villach, Klagenfurt kaj fine revenos al Graz.

**La prezo inkluzivas:**

- 4 tranoktojn en 4-stelaj hoteloj (Ljubljana, Villach, Graz);
- 3 manĝojn tage – ekde tagmanĝo sabate ĝis matenmanĝo merkrede;
  - matenmanĝojn en la hoteloj;
  - tagmanĝojn kaj vespermanĝojn en lokaj restoracioj (inkluzive de akvo);
- ĉiĉeronon en Esperanto dum la tuta programo;
- ĉiujn bezonatajn enirbiletojn laŭ la programo;
- transporton per komforta buso laŭ la itinero.

**La prezo ne inkluzivas:**

- personajn elspezojn kaj hotelajn ekstraĵojn;
- aliajn individuajn enirbiletojn ekster la programo;
- flughavenan transporton;
- personan san- kaj/aŭ vojaĝ-asekuron.

### PROGRAMO

#### 08.08 – sabato
#### Ljubljana – ĉarma verda ĉefurbo

Post komuna tagmanĝo vi forveturos al Ljubljana – malgranda sed tre ĉarma ĉefurbo, ofte nomata unu el la plej verdaj urboj en Eŭropo. La urbo situas inter Alpoj kaj Mediteraneo, kio donas al ĝi mildan klimaton kaj apartan etoson.

Post enloĝiĝo en la hotelo vi ekkonos la urbocentron dum gvidata piedira ekskurso. La malnova urboparto etendiĝas laŭ la rivero Ljubljanica, super kiu troviĝas pluraj pontoj – inter ili la fama Triobla Ponto (*Tromostovje*), arkitektura simbolo de la urbo, projektita de la konata slovena arkitekto Jože Plečnik.

**Vi vidos:**

- la barokan Urbodomon;
- la centran placon Prešeren kun la preĝejo de la Anunciacio;

- la koloran malnovan bazaron;
- la kastelon de Ljubljana, kiu majestie leviĝas sur monteto super la urbo;
- la faman lokan "drakon".

La urbo estas trankvila, piedirant-amika kaj plena je malgrandaj kafejoj ĉe la riverbordo.

**Propono por libera tempo:** supreniri per funikularo al la kastelo por ĝui panoramon, promeni laŭ la rivero aŭ sidi en unu el la kafejoj kaj observi la urban vivon.

Vespermanĝo en tradicia restoracio kun slovena kuirarto.
Tranokto en Ljubljana.



**09.08 – dimanĉo**
**Postojna kaj Predjama – subtera mondo kaj kavaliro en roka kastelo**

Post matenmanĝo vi veturos al la fama kaverno *Postojna* – unu el la plej grandaj kaj imponaj karstaj grotoj en Eŭropo.

Vizito komenciĝas per veturado en subtera trajneto, kiu kondukas vin profunde en la kalkŝtonan monton. Poste vi piede trairos vastajn salonojn kun gigantaj stalaktitoj kaj stalagmitoj, formiĝintaj dum miloj da jaroj. Inter la naturaj

formacioj troviĝas ankaŭ la tiel nomata “Brilanta Salono” kun blankaj kalkaj kolonoj. Vi ekscios pri la rara subtera besto – la proteo (*olm*), simbolo de la regiono.

Post tagmanĝo vi daŭrigos al kastelo *Predjama* – unika kastelo enkonstruita en 123-metra alta roko. Ĝi estas unu el la plej fotataj kasteloj en Eŭropo. Dum la gvidata vizito vi konatiĝos kun la historio de la ribelema kavaliro *Erazem* de *Predjama*, kiu laŭ legendo rezistis sieĝon dum monatoj danke al sekretaj subteraj tuneloj. La kastelo kombinas mezepokan defendan arkitekturon kun natura groto malantaŭ ĝi.

Vespere estas planata reveno al Ljubljana, komuna vespermanĝo kaj tranokto.





**10.08 – lundo**

**Lago Bled kaj alpa pejzaĝo de Jasna, transiro al Villach en Aŭstrio**

Post matenmanĝo vi veturos al *Bled* – pitoreska alpa urbo apud lago kun insuleto meze.

La lago *Bled* estas la vera simbolo de Slovenio. Sur la malgranda insulo staras preĝejo kun sonorilturo; laŭ tradicio, vizitantoj sonorigas la sonorilon por plenumi deziron. Super la lago situas la kastelo *Bled*, konstruita sur roka klifo, de kie malfermiĝas impresa panoramo al la Juliaj Alpoj.

Vi promenos laŭ la lago, aŭskultos pri ĝia historio kaj havos tempon por fari fotojn.

Ne forgesu gustumi la faman deserton “*kremšnita*”, tradician bledan kremkukon!



Posttagmeze vi daŭrigos al la lago *Jasna* apud *Kranjska Gora*. La lago estas konata pro sia smeralda koloro kaj kristalklara akvo, ĉirkaŭita de altaj montoj. Mallonga promenado permesos ĝui la trankvilan alpan etoson.

Poste vi transiros la landlimon al Villach en Aŭstrio.

Vespermanĝo kaj tranokto en Villach.

**11.08 – mardo**
**Lago Wörthersee, Klagenfurt kaj reen al Graz**

Matene vi mallonge konatiĝos kun la centro de Villach – historia urbo en Karintio, kun ĉarma ĉefplaco kaj koloraj domfasadoj.

Poste vi veturos al *Velden am Wörthersee* ĉe la bordo de la fama lago *Wörthersee*. Tie vi enŝipiĝos por plezura ŝipa veturo ĝis *Klagenfurt*. La lago *Wörthersee* estas konata kiel somera ripozejo kun turkisa akvo kaj milda klimato. Dum la ŝipveturo vi ĝuos pejzaĝojn de vilaoj, montetoj kaj feriejoj laŭ la bordo.

En Klagenfurt ni vizitos la faman *Minimundus* – parkon kun miniaturaj modeloj de konataj konstruaĵoj el la tuta mondo. Ĉi tie oni povas "vojaĝi ĉirkaŭ la tuta mondo" dum nur kelkaj horoj. Sur vasta malferma areo troviĝas pli ol 150 detalajmodeloj de famaj konstruaĵoj el ĉiuj kontinentoj, faritaj en la skalo 1:25.

Inter la modeloj videblas la Eiffel-Turo, la Taĝ-Mahalo, la Baziliko de Sankta Petro en Romo, la Operdomo de Sidnejo kaj multaj aliaj mondfamaj monumentoj. Ĉiu modelo estas detale prilaborita kun arkitektura precizeco, kaj informaj tabuloj klarigas la historion kaj signifon de la originala konstruaĵo. Promenado inter la miniaturoj estas agrabla kaj facila, kun multaj lokoj por ripozi kaj admiri la tutmondan arkitekturan heredaĵon.

Posttagmeze ni reveturos al nia kongresurbo Graz. Vespermanĝo en tradicia stiria restoracio kaj tranokto en Graz.

**12.08 – merkredo**
**Forveturo**
Matenmanĝo en la hotelo. Libera forveturo laŭ individuaj planoj.





**Prezo:**

- Unupersona ĉambro: 1490 €
- Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 1200 € p.p.
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 1200 € p.p.

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

## Tuttagaj ekskursoj

**Ĉiuj tuttagaj ekskursoj inkluzivas:**

- vojaĝon per turisma buso;
- tuttagan gvidanton en la germana kaj akompananton/tradukanton en Esperanto;
- tagmanĝon.

### E1 Suda Stirio: oleo kaj vino

De nigra oro ĝis blanka vino

*merkrede 9h15 - 17h45*

En la montetoj de Suda Stirio maturiĝas bonegaj blankaj vinoj, kiuj akiras internacian rekonon. Vin atendos vingustumado kaj vizito de la 300-jaraĝa vinkelo de la episkopa palaco de Seggau, unu el la plej imponaj vidindaĵoj de Stirio. Poste, vi vizitos tradician kukurbseman olemuelejon por provi la "nigran oron" de Stirio. Fine, vi povos ĝui abundan malvarman regionan manĝon el lokaj produktoj, kune kun glaso da stiria vino aŭ suko en tipa stiria *Buschenschank* – simpla, familia vinĝardena gastejo – kun mirinda vido al la ĉirkaŭaj vitejoj.

**Prezo: 120 €**



## E2 Orienta Stirio: fortikaĵo kaj ĉokoladfabriko

Kastelo Riegersburg kaj mirinda ĉokolado

***merkrede, ĵaŭde 9h00 - 17h30***

La fortikaĵo Riegersburg majeste staras sur kruta vulkana roko kaj proponas belan panoramon super la montetoj de orienta Stirio. Dum jarcentoj ĝi estis konsiderata nevenkebla fortikaĵo – hodiaŭ vi povas "konkeri" ĝin en nur 90 sekundoj per la dekliva lifto. Dum gvidata vizito vi malkovros la legendan historion de la kastelo kaj ĝiajn imponajn defendajn sistemojn.

Poste ni vizitos tipan stirian *Buschenschank* – tradician vinĝardenan gastejon – kie ni ĝuos malvarmajn regionajn manĝaĵojn (diversajn viandojn, fromaĝojn kaj aliajn lokaĵojn) kaj glason da vino aŭ suko, kun bela vido al la ĉirkaŭa pejzaĝo.

La ekskurso daŭros al *Bergl*, kie troviĝas la fama ĉokoladfabriko *Zotter*. Tie vi povos gustumi multegajn specojn de ĉokolado kaj kaj konatiĝi kun la tuta procezo de ĉokoladfarado. Dum la vizito vi malkovros diversajn gustojn kaj ingrediencojn, kaj havos la eblon gustumi ĉokoladon kun la plej unikaj kaj surprizaj gustokombinoj.

**Prezo: 150 €**



## E3 Norde de Graz

*Groto kaj monaĥa tradicio*

***lunde, merkrede 9h15 - 17h45***

Malkovru la ĉarman altmontaran regionon norde de Graz. La ekskurso komenciĝos per vizito al la impona stalaktita kaverno en *Semriach*, kie vin fascinos la miriga subtera mondo de kalkaj formiĝoj, stalaktitoj kaj stalagmitoj. Ni promenos tra la kompleksa kavernsistemo kaj malkovros ĝiajn geologian riĉecon kaj historion. Kunportu varmajn vestaĵojn!

Poste ni ĝuos dupladan tagmanĝon en agrabla loka gastejo. Sekvos vizito al la pilgrima preĝejo *Maria Straßengel* – unu el la plej gravaj ekzemploj de aŭstra altgotika arkitekturo – kaj al la abatejo Rein, la plej malnova seninterrompe loĝata cisterciana abatejo en la mondo.

**Prezo: 130 €**



## E4 Historiaj monaĥejoj

Admont kaj Rein

***merkrede 8h30 - 18h30***

La benediktana abatejo *Admont*, ĉirkaŭita de la montoj de *Gesäuse*, estas la plej malnova monaĥejo en Stirio kaj kunigas kredon, kulturon kaj naturon. Ĝia fama abateja biblioteko – ĉefverko de la malfrua baroko – impresas per harmonia kunfandiĝo de arkitekturo, freskoj, skulptaĵoj kaj historiaj manuskriptoj. Dum gvidata vizito vi povos sperti tiun ĉi esceptan spacon, kiu estas konsiderata unu el la plej belaj monaĥejaj bibliotekoj en la mondo.

Post 2-plada tagmanĝo en la trankvila restoracio de la abatejo, ni direktiĝos reen al la regiono de Graz. Survoje ni vizitos la abatejon Rein – la plej malnovan seninterrompe loĝatan cistercianan monaĥejon en la mondo.

**Prezo: 155 €**



## E5 Maribor

Trans la landlimo al Slovenio

***merkrede, vendrede 8h30 - 18h15***

Dum tiu ĉi ekskurso vi povos viziti la najbaran landon – Slovenion! Maribor, la dua plej granda urbo de Slovenio, estas ĉarma urbo kun riĉaj historiaj kaj kulturaj radikoj. Ĝi situas rekte ĉe la rivero Drava, ĉe la piedo de la montaro Pohorje.

La forta vintradicio de la urbo speguliĝas en ĝia plej fama simbolo – la plej malnova vito en la mondo, registrita en la Guinness-libro de rekordoj, kiu kreskas en la urbocentro – kaj en la ĉirkaŭaj vinvojoj. Dum gvidata promenado tra la vigla urbocentro vi konatiĝos kun la plej gravaj vidindaĵoj kaj la historio de la regiono.

Post trankvila 2-plada tagmanĝo la ekskurso daŭriĝos tra la pitoreskaj vitejoj laŭ la slovena vinvojo. Belaj panoramaj punktoj laŭvoje invitos vin halti, fari fotojn kaj krei memorindajn momentojn.

**Prezo: 110 €**



# E6 Stübing kaj Rein

Subĉiela muzeo kaj monaĥejo

***marde, merkrede 9h15 - 17h30***



Ĉi tiu ekskurso kondukas vin al la historia kaj spirita kerno de Stirio. La tago komenciĝas per gvidata vizito de la monaĥejo *Rein*, la plej malnova seninterrompe loĝata cisterciana monaĥejo en la mondo. Dum la prezento pri la baziliko de *Rein* vi konatiĝos kun ĝia arkitekturo, historio kaj religia signifo, kaj partoprenos mallongan preĝservon.

Poste vi veturos al la Aŭstra Subĉiela Muzeo en Stübing, kie vin atendos duplada tagmanĝo en la muzea restoracio. Poste sekvos gvidata vizito nomata "Sekretoj malantaŭ fermitaj pordoj", kiu malkaŝas la ĉiutagan vivon kaj tradiciojn de pasintaj jarcentoj.

Fine restos libera tempo por memstare promeni inter la historiaj bienoj kaj ĝui la etoson de la subĉiela muzeo.

**Prezo: 95 €**

Fotoj: © Graz Tourismus, Tom Lamm



# Duontagaj ekskursoj

## D1 Malkovru Graz

***sabate, dimanĉe, ĵaŭde 14h45 - 18h00***
***lunde, marde 9h00 - 12h15***

Ekkonu la kongresurbon! Dum la promeno vi konatiĝos kun la plej gravaj simboloj de la urbo: de la Horloĝturo kun siaj nekutimaj montriloj ĝis la insulo el vitro kaj ŝtalo sur la rivero Mur, de la imperiestra maŭzoleo ĝis la artodomo "*Kunsthaus*" – la tiel nomata "amika eksterterano".



**Prezo: 19 €**

## D2 Panoramo de Graz

***sabate, dimanĉe 14h15 - 17h30***
***lunde, marde, ĵaŭde 18h00 - 21h15***

Krom trarigardo de la Malnova urbo, tiu ĉi ekskurso gvidos vin ankaŭ supren al la monteto *Schlossberg* per la funikularo. Malmultaj urboj povas fanfaroni pri facile promenebla monteto rekte en la koro de la malnova urbo! Antaŭ pli ol mil jaroj sur la roka elstaraĵo staris fortika kastelo, kiu donis sian nomon al la urbo. Vi vizitos la sonorilturon kaj la faman horloĝturon – la simbolojn de Graz. Dum la supreniro vi ĝuos belajn panoramojn super la tegmentoj de la urbo, akompanatajn de klarigoj de sperta gvidanto.

**Prezo: 25 €**



Fotoj: © Graz Tourismus, Harry Schiffer, Werner Krug

## D3 Stratarto de Graz

*vendrede 14h45 - 18h00*

Graz abundas je buntaj muroj, kiuj meritas pli atentan rigardon. For de la kutimaj turismaj vojoj, la grafitioj montras la zorgojn, ideojn kaj humoron de la lokuloj. Kiuj temoj gravas? Kio kortuŝas la loĝantojn de Graz, kio ilin ĝenas aŭ ridetigas?

Ĉu per politikaj mesaĝoj, ĉu per "glumarkaj militoj" inter futbalŝatantoj, ĉu simple per ĉarmaj figuroj de bestoj – la urbo fariĝas vasta subĉiela galerio. Dum la promenado vi malkovros tiun ĉi viglan, foje surprizan flankon de Graz.

**Prezo: 19 €**



@ Holding Graz/Foto Fischer

## D4 Graz per sentegmenta buso

*lunde, marde 10h30 - 12h30*

Ekkonu Graz el alia perspektivo – de speciala sentegmenta buso! Dum ĉirkaŭ 90-minuta veturo tra la urbo, sperta gvidanto akompanos vin per interesaj rakontoj kaj klarigoj pri la historio, arkitekturo kaj ĉefaj vidindaĵoj de la urbo. Tiu ĉi ekskurso estas la plej komforta maniero konatiĝi kun Graz.

**Prezo: 25 €**



# D5 Kastelo Eggenberg

*marde, ĵaŭde, vendrede 8h30 - 13h30*

Dum ĉi tiu gvidata ekskurso vi vizitos la imponan kastelon Eggenberg – unu el la plej gravaj barokaj monumentoj de Graz. La kastelo fascinas per sia arkitekturo kaj riĉe ornamitaj ĉambroj. La arkitekturo de la kastelo inkluzivas multajn elementojn el la gregoria kalendaro: ĝi havas 365 eksterajn fenestrojn, ĉiu etaĝo havas 31 ĉambrojn, la dua etaĝo havas 52 fenestrojn kaj 24 solenajn salonojn, kaj la ĉefa festosalono nomiĝas "planeda salono".

En la sama loko troviĝas la Arkeologia Muzeo de Graz, kie ni konatiĝos kun elstaraj trovaĵoj el la prahistorio kaj antikva epoko. La viziton kompletigos promeno tra la vasta ĝardeno de Eggenberg, ideala por ĝui la trankvilan etoson kaj la belan ĉirkaŭaĵon.

**Prezo: 35 €**



# D6 Thal: muzeo de Arnold Schwarzenegger kaj la Paroĥa Preĝejo

*lunde, ĵaŭde 9h00 - 13h00*

Ĉu vi sciis, ke la mondfama aŭstra-usona aktoro Arnold Schwarzenegger naskiĝis kaj kreskis en Thal, vilaĝo kelkajn kilometrojn for de Graz?

Dum la ekskurso ni vizitos lian familian domon – hodiaŭ la muzeon, dediĉitan al lia vivo. En la vilaĝo estas kelkaj aliaj lokoj ligitaj kun la loka stelulo – ekzemple stangoj, per kiuj li trejniĝis, kaj eĉ estas bazlernejo nomita laŭ li.

Ni vizitos ankaŭ alian vidindaĵon de Thal – Paroĥan Preĝejon, ornamitan en unika stilo de la artisto Ernst Fuchs. La ekskurson kompletigos mallonga promenado laŭ bela lageto *Thaler See*.

**Prezo: 35 €**



Fotoj: © Graz Tourismus, Harry Schiffer

## D7 Armila muzeo

*ĵaŭde 14h45 - 17h00*

Tiu ekskurso interesos ŝatantojn de historio kaj mezepoko! Vi vizitos la faman *Landeszeughaus* – la plej grandan historian armilejon en la mondo. Hodiaŭ ĉi tie konserviĝas ĉ. 32 000 objektoj: kirasoj, pafiloj kaj kanonoj, stangarmiloj kaj tranĉarmiloj, kuglogisoj kaj pulvujoj. Ĉio estas aranĝita sur kvar etaĝoj kun pli ol 2000 kvadrataj metroj da ekspozicia spaco.

**Prezo: 19 €**



## D8 Folklora muzeo

*dimanĉe 14h30 - 17h00*
*vendrede 9h30 - 12h00*

Konatiĝu kun la loka historio kaj folkloro! Dum ĉi tiu ekskurso vi vizitos la muzeon *Volkskundemuseum*, kiu prezentas la popolajn tradiciojn kaj ĉiutagan vivon de Stirio tra la jarcentoj. En la ekspozicio videblas tradiciaj kostumoj, metioj, hejmaj objektoj kaj festaj kutimoj, kiuj spegulas la kulturan riĉecon de la regiono.

**Prezo: 17 €**

## D9 Historia muzeo

*dimanĉe, vendrede 14h30 - 17h00*

Dum ĉi tiu ekskurso vi vizitos la historian muzeon de Graz – *Museum für Geschichte*. La muzeo prezentas la historion de la regiono de Stirio de prahistorio ĝis la moderna epoko per riĉa ekspozicio. Vi vidos diversajn historiajn objektojn kaj artefaktojn, kiuj helpas kompreni la socian, kulturon kaj teknikan evoluon de la regiono tra la jarcentoj.

**Prezo: 17 €**

Fotoj: © Graz Tourismus, Harry Schiffer

## D10 Artodomo

*marde 14h30 - 17h00*



Dum ĉi tiu ekskurso vi vizitos la artodomon *Kunsthaus*, unu el la plej rimarkindaj modernaj arkitekturaj simboloj de Graz, kiu troviĝas ĉe la bordo de la rivero Mur. Pro sia nekutima, "eksterterana" formo la konstruaĵo ofte estas nomata la "amika eksterterano". Ene troviĝas ekspozicioj dediĉitaj al nuntempa arto, prezentantaj verkojn de internaciaj artistoj kaj aktualajn artajn tendencojn. La ekskurso donas interesan enrigardon en modernan arkitekturon kaj nuntempan arton.

**Prezo: 19 €**

## D11 Muzeo de ŝlosiloj, seruroj kaj ferarto

*lunde 13h30 - 16h30*
*vendrede 9h15 - 12h30*

Dum ĉi tiu ekskurso vi vizitos la unikan *Schell Collection* – muzeon dediĉitan al la historio de ŝlosiloj, seruroj kaj ferarta gisado. La kolekto prezentas milojn da objektoj el diversaj jarcentoj kaj regionoj de la mondo: arte prilaboritajn ŝlosilojn, komplikajn serurojn kaj imponajn ekzemplojn de ferarta metiarto. La ekspozicio montras ne nur la teknikan evoluon de sekurecaj mekanismoj, sed ankaŭ ilian artan kaj kulturhistorian signifon.

**Prezo: 19 €**

Fotoj: © Graz Tourismus, Harry Schiffer

## D12 Bierfabriko Puntigamer

*marde, ĵaude, vendrede 14h00 - 17h30*

Dum ĉi tiu ekskurso vi vizitos la bierfarejon *Puntigamer* en Graz kaj konatiĝos kun la tradicio kaj arto de bierfarado en unu el la plej konataj bierfarejoj de Aŭstrio. Vi ekscios pri la historio de la bierfarejo, la deveno de la krudmaterialoj kaj la tuta bierproduktada procezo. Kiu el vi verŝos la plej belan bieron? Ni eltrovos tion dum la fina biergustumado – kie partoprenantoj povos provi verŝi la plej bonan glason de biero de la krano!

**Prezo: 30 €**

# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

**T = tuttaga ekskurso; M = duontaga ekskurso matene;**
**P = duontaga ekskurso posttagmeze, V = vespera ekskurso.**

| | Sab 1/08 | Dim 2/08 | Lun 3/08 | Mar 4/08 | Mer 5/08 | Ĵaŭ 6/08 | Ven 7/08 | **prezo, €** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 – Oleo kaj vino | | | | | T | | | **120** |
| E2 – Kastelo kaj ĉokoladfabriko | | | | | T | T | | **150** |
| E3 – Norde de Graz | | | T | | T | | | **130** |
| E4 – Historiaj monaĥejoj | | | | | T | | | **155** |
| E5 – Maribor | | | | | T | | T | **110** |
| E6 – Stübing kaj Rein | | | | T | T | | | **95** |
| D1 – Malkovru Graz | P | P | M | M | | P | | **19** |
| D2 – Panoramo de Graz | P | P | V | V | | V | | **25** |
| D3 – Stratarto de Graz | | | | | | | P | **19** |
| D4 – Graz per sentegmenta buso | | | M | M | | | | **25** |
| D5 – Kastelo Eggenberg | | | | M | | M | M | **35** |
| D6 – Thal: Arnold kaj preĝejo | | | M | | | M | | **35** |
| D7 – Armila muzeo | | | | | | P | | **19** |
| D8 – Folklora muzeo | | P | | | | | M | **17** |
| D9 – Historia muzeo | | P | | | | | P | **17** |
| D10 – Artodomo | | | | P | | | | **19** |
| D11 – Muzeo de ŝlosiloj | | | P | | | | M | **19** |
| D12 – Bierfabriko Puntigamer | | | | P | | P | P | **30** |

# Bankedo

La solena bankedo de la Universala Kongreso okazos en **Gösser Bräu** (nur 300 m for de la kongresejo) – historia gastejo, kie ekde 1902 oni servas tradiciajn aŭstrajn pladojn. La ejo, prizorgata de la familio Grossauer, kunigas longdaŭran tradicion kun nuntempa gastamo kaj emfazas freŝajn, regionajn ingrediencojn.

## Menuo 1 – Vianda

- **Supo:** Delikata klara bovaĵa buljono kun maldikaj pastostrioj
- **Ĉefplado:** Tradicia aŭstra bovaĵa gulaŝo, servata kun pastobulo (*Semmel-knödel*)
- **Deserto:** Trikolora ĉokolada ŝaŭmaĵo kun bera kompoto

## Menuo 2 – Vegetara

- **Supo:** Sezona krema supo
- **Ĉefplado:** Fromaĝaj nokoj (*Käsespätzle*) – tradicia montregiona pastoplado kun aromriĉa fromaĝo kaj mildaj rostitaj cepoj, servataj kun freŝa verda salato
- **Deserto:** Trikolora ĉokolada ŝaŭmaĵo kun bera kompoto

## Menuo 3 – Vegana

- **Supo:** Sezona krema supo
- **Ĉefplado:** Vegana terpoma gulaŝo
- **Deserto:** Refreŝiga frukta ŝorbeto

## Trinkaĵoj

Komence de la bankedo ĉiu gasto ricevos unu trinkaĵon laŭ sia elekto el trinkaĵoj, kiuj reprezentas la lokan gustotradicion de Graz kaj Stirio:

- *Gösser Braufrisch* – freŝa, malpeza biero el la fama loka bierfarejo Gösser,
- *Weißer Spritzer* – klasika aŭstra refreŝigaĵo el blanka vino kaj gasa akvo,
- *Roter Spritzer* – eleganta variaĵo kun ruĝa vino kaj gasa akvo,
- *Almdudler g'spritzt* – tradicia herba limonado de Aŭstrio, miksita kun gasa akvo. Dum la deserto estos servataj kafo aŭ teo, laŭ via prefero.

**Prezo:**

| | |
|---|---|
| Menuo 1 / 2: | 88 EUR |
| Menuo 3: | 75 EUR |

**Por partopreni en la bankedo, bonvolu antaŭmendi vian lokon.**
**Pro organizaj kialoj ne eblos aĉeti bileton surloke!**

# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

## Esperantaj

**54-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK)** en Graz, Aŭstrio
1-8 de aŭgusto, *iik.uea.org*

**82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)** en Tiana, Katalunio
9-16 de aŭgusto, *ijk2026.tejo.org*

**59-a Kongreso de ILEI** en Zaozhuang, Ĉinio
10-16 de julio, *ilei.info*

**77-a Kongreso de IKUE** en Graz, Aŭstrio
25-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto, *ikue.org*

**74-a KELI Kongreso** en Görlitz, Germanio
8–15 de aŭgusto, *keli.chez.com*

**99-a Kongreso de SAT** en Leono, Hispanio
19-26 de julio, *satesperanto.org*

**47-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF)** en Ĉeĥio, Kaprálův mlýn
20-30 de julio, *familioj.miraheze.org/wiki/REF*

## Neesperantaj

**La Strada** en Graz, Aŭstrio
31-a de julio – 8-a de aŭgusto, *lastrada.at*
Granda internacia art-festivalo kun prezentoj en diversaj lokoj de la urbo

# Pliaj informoj

### Disdonado de reklamiloj kaj informiloj

UK estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri nova iniciato, speciala agado de via faka asocio, reklami novan eldonaĵon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci renkontiĝon, kurson, varon ktp. Plej efike estas meti vian informilon en la dokumentujon, kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo kostas 275 € kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA (bv. kontakti la Kongresan fakon ĉe kongresoj@co.uea.org). Nenio rajtas esti distribuata kongreseje sen tiu permeso.

### Salonmendoj, standoj kaj budoj

Ĉiuj fakaj asocioj konataj de UEA ricevis mendilon pri salono por sia kunveno dum la UK. Salonmendoj devas atingi la Kongresan fakon ĝis la 30-a de aprilo 2026. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocio. Se via asocio ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso (kongresoj@co.uea.org).

Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj, kiuj volas aparte informi, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (400 €). La budon oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

### Kongresa Libroservo

Jen unika okazo aktualigi vian bibliotekon: en la Kongresa Libroservo multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj kaj plurajn titolojn eblos aĉeti kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Por vendigi viajn eldonaĵojn, necesas oferti ilin al la Libroservo de UEA (libroservo@co.uea.org) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

### Pagmanieroj

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun, kiu estas por vi la plej oportuna. La pagojn por mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

**Via UEA-konto.** Vi povas plenigi vian UEA-konton per bankokarto pere de la sistemo Stripe (ne forgesu mencii vian UEA-kodon) uzante tiun ĉi ligilon.

**Banko.** Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

- ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNANL2A);
- ING Bank, Postbus1800, NL1000 BV Amsterdam (IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64, BIC/SWIFT: INGBNL2A).

Monsendojn al ĉi tiuj du kontoj bv. fari nepre en EUR. Eventualajn administrajn bankokostojn ĉiam pagas la mendanto.

**PayPal.** Eblas pagi pere de PayPal uzante la adreson financoj@co.uea.org. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

### Asekuro

La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (loĝado, ekskursoj k.a.) se la malmendo venas post la limdato. Tial estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno.

### Donacoj

La UK bonvenigas donacojn por:

**Ĝenerala Kaso:** por la ĝenerala subteno al la organizado de UK.

**Adoptaj Gepatroj:** subvencias partoprenon en la Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.

**Fondaĵo Canuto:** helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.

**Fondaĵo Claude Nourmont:** subtenas kulturajn aranĝojn dum la Universalaj Kongresoj kaj ĝenerale.

**Fondaĵo Partoprenu UK-on:** helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.

**Blindula Kaso:** helpas al blindaj kongresanoj.

**Arta Kaso:** helpas financi artistojn por prezentiĝo dum Universalaj Kongresoj.

**Infana kongreseto:** helpas kovri kostojn de Internacia Infana Kongreseto.

**Klimato – $CO_2$** – por ekologiaj projektoj, kompensantaj la poluadon, okazantan i.a. pro transportado de kongresanoj al UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo Esperanto.

# Sekvu la novaĵojn ĉe:

- **uk.esperanto.net**
- **Telegram-grupo: uk.telegramo.org**
- **Facebook @universala.kongreso**
- **Instagram @universala.kongreso**
- **uea.org/kongresoj**



## Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe https://uea.org/alighoj

# Kontaktoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Ni petas kontakti nin per la retpoŝtadreso:**

## kongresoj@co.uea.org

Pri ĉiuj temoj rilataj al la Kongreso, bonvolu kontakti ne la LKK, sed la Kongresan Fakon.



# Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!




**Eventa Servo** estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.